

STARTO

N-ro 2/2012 (243)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Esperanto-arbo (tilio) en Svitavy
14. 4. 2012

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marĉek: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, vl.dv@centrum.cz, 774 999 091 (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj krom UEA, EEU)

Vicprezidantino (komitatano A de UEA): Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (UEA, EEU, membroj, sekcioj, kluboj, konferencoj, protokolado)

Vicprezidantino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257, dvor.libuse@seznam.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Kasisto: Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz (membrodatumbazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.esperanto@gmail.com (informado, retaj projektoj, ekspozicioj, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec@volny.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, miropiro2312@gmail.com (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

Revizia komisiono de ĈEA:

Prezidanto: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge, la komitato.

Trilanda konferenco en Břeclav

Je 30.4.2012 la organizantoj ĝuis jam pli ol 25 aliĝojn, el kiuj triono venas el Aŭstrio kaj neniuj ĝis nun el Slovakio. Oni konsideras tion parta sukceso, ĉar la aranĝo okazos nur fine de septembro.

Tamen necesas memori, ke:

1. plej avantaĝa periodo por aliĝi finiĝos 7.7.2012 (semajna prokrasto),
2. jam elĉerpiĝis kapacito de unulitaj ĉambroj en la hotelo (kaj nur en vere urĝaj okazoj oni provos aranĝi kroman),
3. preskaŭ ĉiuj deziras ekskursi al la kastelo Lednice kaj tial ankaŭ la ekskurso estas jam duonvendita!

Bv. tial bone pripensi ĉu ne indas ankaŭ frue aliĝi kaj ne atendi kutimajn lastmomentajn aliĝdatojn. Oni petas aliĝon precipe de tiuj, kiuj pripensas loĝadon en la hotelo, ĉar tie kapacito estas strikte limigita kaj krome temas pri vere pintaj datoj pro la urbaj solenaĵoj, kiam komparebla loĝado ne haveblas. Estas krome klare, ke kiam ekvalidos laŭ la kontrakto malmendokondiĉoj, ĈEA devos

rezigni pri ĉiuj ne rezervitaj ĉambroj por eviti punon kaj verŝajne ne plu ricevos ilin.

Tamen ankaŭ en internulejo pli fruaj aliĝintoj ĝuas avantaĝojn (ekz. ĉu elekti teretaĝon aŭ dulitan ĉambron).

ĈEA atendas vian amasan partoprenon, ĉar krom bunta enurba festa programo kaj eksterlandaj esperantistoj atendas vin grava labora parto, kie oni decidis i.a. pri asocia budĝeto kaj kotizoj por venontaj jaroj, pri eventuala adapto de Starto-enhavo kaj periodo aŭ oni traktos funkciadon de ekestintaj diverskampaj laborgrupoj, al kiuj vi povas laŭplaĉe aliĝi!

Ne forgesu, ke per frua aliĝo vi sendube helpas al ĈEA kaj al la sukceso de la tuta aranĝo kaj ties planado.

Vladimír Dvořák

Rimarkigo: *Invitilo al la konferenco aperis en la antaŭa numero de Starto (paĝoj 19-20), same ankaŭ la aliĝilo, libere enmetita. Ĉe la asocia domajno estas disponebla ankaŭ elektronika aliĝilo:*

<http://www.esperanto.cz/eo/akce/trilanda-konferenco-443.html>



hotelo IMOS



studenthejmo

Demandaro pri informado al ĈEA-membroj

Partan rezulton vi jam povis legi en la pasinta numero de Starto, sed eblas (eĉ indas) plu respondi ĝin, ĉar ĉio ĉi sendube helpos al la estraro pli bone orientiĝi kaj plenumi dezirojn de la membraro.

Tial mi denove petas ĉiujn, kiuj ankoraŭ ne respondis la demandaron enmetitan en Starto-n 4/2011, ke ili dediĉu iom da tempo kaj forsendu siajn opiniojn al la kasisto V. Hirš (kontaktojn vi trovos sur la kovrilpaĝo). Same tre utilos, ke ĉiuj posedantoj de retadreso, sendu ĝin al la sama adreso por ke ni kreu plej eble vastan reton por pli facila kontaktado. Ni garantias ne misuzi viajn adresojn por aliaj celoj!

Finajn rezultojn kaj ties konkludojn ni komune traktos dum ĉi-jara konferenco en Břeclav, kiu devos decidi gravajn taskojn kiel ekz. enhavon kaj periodon por Starto aŭ aprobi novan tabelon pri membrokotizoj kun celo ne nur altigi, sed optimumigi.

Tial mi lastfoje antaŭ la konferenco sincere invitas vin al ĝi kaj atentigas, ke la plej avantaĝa aliĝperiodo finiĝos 7.7.2012 (semajna prokrasto). La aliĝilo aperis en la antaŭa numero aŭ en elektronika formo troviĝas sur la ĈEA-retpaĝaro.

Vladimír Dvořák

VETURILO

je název cyklistického systému půjčoven (2100 kol) ve Varšavě. Esperantský název zvítězil v internetovém hasování (32%) před názvem Wawabike (26%).

Ĉu Vi volas viziti kun ni tiun ĉi unikan pilgrim-preĝejon?



Partoprenu la 6-an Internacian kongreson de Asocio de Esperantistaj Handikapuloj en la tagoj 13.-16.9.2012 en Štíří Důl ĉe Krucemburk.

La aliĝilojn ni akceptas ĝis 25.7.2012. La kongreso okazos en somerejo, do ne en ia luksa hotelo, tamen en tre agrabla naturo. Tiuj, kiuj pli ŝatas dulitajn ĉambretojn ol plurlitajn, devas pli rapidi kaj sendi frue la aliĝilon kaj antaŭpagon.

Tiun ĉi interesan pilgrim-preĝejon „Zelená Hora“ (Verda Monto) ni vizitos en la sabata ekskurso.

La tuta restado inkluzive de manĝado, kongresa kotizo kaj busekskurso kun enirbileto en la preĝejon kostas 1760,-Kč (85 eŭroj).

Pri pluaj informoj aŭ aliĝiloj skribu al la redakcio de AEH ĉe Jarmila Rýznarová, Pardubice

aeh-ikeh@volny.cz

Výsledek hospodaření ČES za rok 2011, plán na rok 2012 a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích.

Příjmy	rok 2011	plán 2012	Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2011	
předplatné Starto	0	1 000	Peněžní prostředky	
písemné kurzy	2 500	3 000	pokladna korunová	369
prodané zboží libroservo	5 308	5 000	postkonto	11 625
brožura Objevte esperanto	3 140	3 000	účet Fio	37 811
příspěvky ČES na běžný rok	22 260	20 000	účet Fio spořicí	64 042
příspěvky ČES na budoucí rok	29 540	30 000	peníze celkem	113 847
konference (sjezd) ČES	63 485	190 000	Investice	
akce klubů a sekcí bez PS	10 916	15 000	podílové listy	172 351
Wikimánie	27 432	0	Investice celkem	172 351
konference nevidomých	271 409		pohledávky	
ostatní nedaňové příjmy	21 219	0	dar SONS	60 000
dotace	48 000	40 000	účet v EUR u UEA	15 436
dobrovolné příspěvky a dary	23 170	85 000	pohledávky celkem	75 436
úroky z účtů	88	1 500	ostatní majetek ČES	
příspěvky UEA na běžný rok	16 340	15 000	vybavení muzea v ceně pořízení	141 533
příspěvky UEA na budoucí rok	19 350	20 000	knihy (odhad)	39 150
kongr. popl. na běžný rok	15 600	0	
kongr. popl. na budoucí rok	0	24 000	ostatní majetek ČES celkem	180 683
příspěvky IFEF	350	0		
příspěvky ILEI	2 400	1 800		
kurzový zisk	3 962	0		
Příjmy celkem	586 469	454 300		
			závazky	
Výdaje	rok 2011	plán 2012	platby pro UEA	6 000
poštovné a tisk Starto	36 352	40 000	Český železničářský esp. svaz	1 300
písemné kurzy	0	1 000	EK Olomouc	260
poštovné a balné libroservo	0	500	EK Svitavy	7 414
nákup zboží pro libroservo	0	5 000	závazky celkem	14 974
brožura Objevte esperanto	18 360	0	Účelově vázané prostředky	
telefon, pošt., cest., kanc.potř.	4 995	6 000	fond Tilio	27 392
náklady schůzí výboru ČES	4 945	5 000	fond ediční	12 660
konference (sjezd) ČES	57 141	180 000	kluby a sekce bez PS	66 961
akce klubů a sekcí bez PS	12 470	15 000	Celkem	107 013
Wikimánie	42 507	0	Pozn:	
konference nevidomých	331 506	0	Po započtení darů/dotací vykazuje Wikimánie nulové saldo a konference nevidomých přinesla sekci zisk přes 20.000 Kč	
muzeum (akce, výstavy)	1 086	20 000		
ostatní nedaňové výdaje	0	10 000		
poplatky bance	1 705	200		
příspěvky UEA	27 185	30 000		
kongr. poplatek	47 877	0		
příspěvky ILEI	2 706	1 500		
příspěvky IFEF	80 407	1 300		
náklady UEA kolekt. čl. + EEU	2 287	3 000		
kurzová ztráta	0	0		
Výdaje celkem	671 529	318 500		

DU INTERESAJ ARANĜOJ

Dum la lastaj semajnoj mi partoprenis du interesajn internaciajn aranĝojn, pri kiuj mi volas disdividi miajn impresojn kun la legantoj de Starto.

Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA

La 28-an de aprilo mi ĉeestis la 34-an Malferman Tagon en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Ĝi okazis precize 50 jarojn post la ekfunkcio de la domo kiel la Centra Oficejo de UEA. Ĝin partoprenis krom la oficistoj kaj funkciuloj de UEA ĉirkaŭ 85 ĉeestantoj. Krom kunesti la solenaĵon mi havis du kialojn, pro kiuj mi veturis tien. Unue, mi devis transdoni al Internacia Esperanto-Instituto la stokon de la libroj, kiujn mi laŭmende produktis por ĝi. Due, mi povis uzi la okazon prezenti la novan eldonon de la dramo de Karel Čapek „R.U.R.“, kiun mi eldonis en mia eldonejo KAVA-PECH kaj kiu estis envicigita en la serion de UEA „Oriento-Okcidento“. Post „Ŝvejk“ en 2004 kaj Biblio en 2006 estas jam la tria eldonaĵo de KAVA-PECH inter ĝis nun 50 titoloj de tiu prestiĝa serio.

Dum tiu tago okazis en la CO multaj tre interesaj aranĝoj, kiel kutime paralele en pluraj salonoj, do ne eblis partopreni ĉiujn. Mi do fokusiĝos nur al kelkaj, kiuj kaptis mian atenton pleje.

La tago komenciĝis tradicie per prezentado de novaĵoj en la oferto de la UEA-libroservo. Ilin rutine, tamen per tre interesa maniero, prezentis la ĉefo de la libroservo Ionel Onet. Li ne menciis tri novaĵojn, kiuj estis sekve aparte prezentitaj: Ziko van Dijk prezentis sian

verkegon Historio de UEA, adapton de sia doktoriĝa disertaĵo por Esperanto-legantaro, Yves Nevelsteen la duan eldonon de prikomputila terminaro Komputeko, mi mem havis la ŝancon konatigi la publikon kun la jam menciita dramo R.U.R. Post tiu prezento kaptis min Barbara Pietrzak por intervjui min por Pola Radio pri tiu grava verko de Čapek, sed ankaŭ pri la Internacia Esperanto-Konferenco en Svitavy kun la temo „Sciencfikcio kaj robotoj“, okaze de kiu mi ĝin eldonis. La rezulto aŭdeblas ĉe

<http://retradio.posterous.com/>,
elsendo n-ro 121 el 15-a de majo, ekde proksimume la mezo.



Ulrich Lins (foto: Ziko van Dijk)

La ĉefa preleganto estis la fama historiisto Ulrich Lins, kiu jam pli ol kvar jardekojn vizitadas la Centran Oficejon. Dum sia prelego li rememoris gravajn personojn, kiujn li tie renkontis dum siaj vizitoj, sed li ankaŭ menciis plurajn movadajn eventojn ligitajn al la domo.

Oni povis sekvi multajn valorajn programerojn, ekzemple tiujn de TEJO-prezidanto Łukasz Żebrowski, de ILEI-prezidanto Stefan McGill kaj de EEU-prezidanto Seán Ó Riáin, ĝui Esperantofilmojn, ktp.

Grandan intereson vekis la libroservo, kiu tradicie proponis porokazan rabaton validan nur dum la Malferma Tago.

La Malferma Tago finiĝis per respondoj de UEA-estraro. Ĉeestis 6 el 7 estraranoj, ĉar tuj poste komenciĝis la estrarkunveno.

Komuna Esperanto-Kongreso en Berlino

La komuna Esperanto-kongreso de germanaj, danaj kaj polaj esperantistoj okazis en Berlino de vendredo la 25-a ĝis lundo la 28-a de aprilo, ĉar la pentekosta lundo estas en Germanio kaj en Pollando libera tago. Partoprenis ĝin preskaŭ 200 personoj, tamen inter ili nur malmultaj danoj. Mia dana amiko diris al mi, ke li estas seniluziiginta, sed ja temis pri utila eksperimento, kaj pro ties rezulto danoj apenaŭ plu kongresos eksterlande.



Seán Ó Riáin kaj Detlev Blanke

Krom la oficialaj malfermo vendrede vespere kaj fermo lunde tagmeze ĉiuj ceteraj programeroj trapasis paralele en minimume du, plejparte tri, aŭ eĉ kvar ĉambroj samtempe. Mian atenton kaptis precipe prelegoj de Detlev Blanke kaj Seán Ó Riáin, kies prelegon en Roterdamo mi maltrafis. Ili ambaŭ parolis pri la lingva situacio en EU.



Rudolf Fischer prelegas

Tre interesa mi trovis ankaŭ la prelegon de Rudolf Fischer „Kiel nomi ilin“. Ĝi pritraktis la diferencon inter germano kaj germaniano, germana kaj germania, ankaŭ ĝenerale pri aliaj landoj, gentoj, etnoj kaj popoloj, ĉu loĝantaj en sia patrujo, ĉu en alia lando. Tiun lingvan fenomenon mi ĝis nun konsideris klara, sed li per sia prelego miajn konojn aŭ supozojn ĥaosigis. Sed por mi la plej interesa estis la prelego de Mélanie Maradan kaj Johannes Mueller pri la estonteco de Scienca Revuo, kiun mi priskribos pli detale en aparta artikolo.

Por la dimanĉa posttagmezo estis proponitaj diversaj ekskursoj. Mi elektis la promenon en la centro de iama GDR, kiun mi vizitis lastan fojon antaŭ la kuniĝo de Germanio, ĉar mi volis vidi la ŝanĝojn. Dum ĉiuj vesperoj oni povis ĝui kulturon, ekzemple teatraĵon, koncertojn kaj polan kant- kaj dancensemblon.

Petro Chrdle teksto kaj fotoj



Peter Kühnel ĉiĉeronas

ŜANGŬOJ EN SCIENCA REVUO KAJ ISAE

Scienca Revuo (SR) estas la oficiala organo de ISAE (Internacia Scienca Asocio Internacia) kun longa historio. Ja ĝi ekaperis eĉ pli frue ol estis fondita UEA, nome en 1904! Kiam mi komence de la okdekaj jaroj danke al tiama ĝenerala sekretario de ISAE kaj redaktoro de SR d-ro Jozefo Kavka membriĝis, temis pri tre vigla organizaĵo. Ene de ĝi laboris pluraj fakaj sekcioj, i. a. terminologia sekcio, ktp. Dum la lastaj du jardekoj la agado ŝrumpis al nura eldonado de SR, kiu restis sur la ŝultroj de unu persono, profesoro Rüdiger Sachs. Estas mirinde, ke la manuskriptojn por SR ĝis pasinta jaro lingve kontrolis d-ro Kavka, malgraŭ sia aĝo de pli ol 90 jaroj. Dankon por via aktiveco, Jozefo!

Mi devis iom deflankiĝi por ke oni komprenu, kiel malgaja mi estis, kiam mi eksciis, ke prof. Sachs, mia multjara amiko, anoncis definitive ne plu gvidi la asocion, nek redakti kaj eldonadi propra-koste la SR. Mi ja konis liajn vanajn antaŭajn strebojn trovi posteulojn kaj mi do prave timis, ke tio signifos la morton de SR kaj verŝajne ankaŭ de ISAE.

Sed okazis miraklo. La torĉon transprenis junaj kaj kapablaj personoj. La prezidanto estas de pasintjare José Antonio Vergara, kuracisto el Ĉilio kaj antaŭa estrarano de UEA pri faka kaj scienca agado. Kaj la zorgojn pri Scienca Revuo transprenis la duopo d-rino Mélanie Maradan el Svisio, profesia terminologo respondeanta ene de UEA pri rilatoj kun terminologiaj instancoj (Info-term, ISO) kaj d-ro Johannes Mueller, juna germana sciencisto. Dum sia prelego en Berlino ili prezentis la novan retejon de SR (<http://scienca-revuo.info>) kaj la planojn, kiel ĝin pluevoluigi en du formoj:

kaj en reta kaj en tradicia papera. Ĝi plu aperos kvarfoje jare nur en la reto, sed en la papera formo nur unufoje jare kiel almanaho enhavanta ĉiujn kvar numerojn de SR de la koncerna jaro. Laŭ tio estos ankaŭ du kategorioj de la membreco: pli favorpreza por tiuj, kiuj havos aliron nur al la reta eldono, kaj pli kosta, kiu enhavos ankaŭ ricevadon de la klasika papera eldonaĵo.

Oni planas ankaŭ havi en la retejo arĥivon de ĉiuj ĝis nun aperintaj SR-oj. Danke al la kunlaboro kun Internacia Esperanto-Centro en Herzberg jam estas skanitaj multaj malnovaj jarkolektoj de la SR, tamen ili ankoraŭ ne estas en la retejo, ĉar necesas kontroli la skanaĵojn. Ili estos alireblaj por ĉiuj, sendepende de la membreco en ISAE. Nur kelkaj lastaj numeroj estos ĉiam protektataj, ke ilin povu eniri nur la membroj.

Sed la arĥivo de la SR kaj plua redaktado kaj eldonado ne estas la ununura grandioza projekto! Oni jam komencis en la citita retejo la rubrikon „terminologio“, en kiu oni registros fakajn esprimojn, ilian originon, kaj, se estas konate, ankaŭ difinon. Oni jam nun povas konatiĝi kun la sistemo ĉe <http://terminaro.scienca-revuo.info>. Ĉe ĉiu termino estas indikita dato de enigo, fako (laŭ UDK), nokia kodo de ISAE, rilataj nocioj, fonto, kunteksto kaj kie ĝi estis trovita. Kiel menciite, oni planas ankaŭ aldoni difinojn (laŭeble) kaj tradukojn al kelkaj lingvoj.

Scienca Revuo nun ekhavas rubrikojn, ekzemple: Scienco kaj Esperanto, El la scienca mondo, Terminologio, Scienco kaj socio kaj Scienca eĥo. Eventualaj interesiĝantoj pri kunlaboro (ne necesas ke ili membriĝu al ISAE) povas kontakti la ĉefredaktoron aŭ pere de la menciita paĝaro, aŭ rekte per redaktisto@scienca-revuo.info.

Petro Chrdle

KAEST 2012

15-18 novembro 2012

Konferencon pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko gastigos malgranda slovaka urbeto Modra-Harmónia, nur 30 km de la ĉefurbo Bratislava kaj 90 km de Vieno (la loko de SES 2008, SES 2009 kaj KAEST 2010 por tiuj, kiuj partoprenis).

Ĉeftemo de KAEST 2012: „Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj“

La programo konsistos el kelkaj partoj:

- prelegoj (en du paralelaj blokoj – ĉeftemaj kaj alitemaj)
- trejnado (Vikipedio, komputila laboro, metiejoj ks.)
- fakaj diskutoj (pri certa temo)
- vespera (neformala) programo (Vingustumado, filmo-prezento, diskutoj, ks.)
- eblaj ekskursoj (laŭ interkonsento kaj mendoj)

E@I-teamo invitas vin ĉiujn – ĉu aliĝi kaj prelegi aŭ simple aliĝi kaj ĉeesti en **KAEST 2012. Por ke la faka vivo en Esperanto evoluu!**

Novajtoj: pli longa (KAEST okazis jam ekde jaŭda posttagmezo ĝis dimanĉa tagmezo, do 1 tagon pli) – pli da praktika scienco (atendis vin trejnado, povante provi/testi/malkovri mem certajn aferojn) – vingustumado (por la interkona vespero, por pli bone konatiĝi kaj amikiĝi) – eblo de ekskursoj (dum vendreda antaŭtagmezo/ kaj dimanĉa posttagmezo) – por fakaj sekcioj/grupoj propono fak-kunsidi antaŭ/post KAEST! Kontakto kaest@ikso.net, pliajn informojn ĉe <http://kaest.ikso.net>.

Adreso de la KAEST-ejo:

Ŝtudiĵné stredisko ÚJOP ČDV UK
Modra-Harmónia č. 3553
SK-900 01 Modra, Slovakio
www.modra.cdvuk.sk; www.cdvuk.sk

Internacia Esperanto-lernejo

Bartošovice 2012

Verda Stacio – la radio en la lingvo Esperanto – invitas vin ĉeesti la unuan Internacian Lernejon de Esperanto por komencantoj kaj progresintoj, kiu okazos ekde la 8-a ĝis la 11-a de novembro 2012 en la kastelo Bartošovice, en norda Moravio, Ĉeĥujo.

La kastelo situas en la bela parko de vilaĝo Bartošovice, nur 6 km de Ostrava flughaveno kaj 4 km de la fervoja nodo Studénka, 20 km de la urbo Ostrava kaj 12 km de la distrikta urbo Nový Jičín. Rekte en la kastelo estas eblecoj de tranoktado kaj ĉiutaga dieto. Instruado okazos en la moderne aranĝita klasĉambro, lokigita nur 100 m de la kastelo en baza lernejo. Samtempe kun la Esperanta studado, okazos rekte en la salonoj kaj kastela parko la tradicia Fiŝkaptista Festivalo, kiun ankaŭ vi povas partopreni kaj gustumi fiŝmanĝaĵojn de ĵus kaptitaj freŝaj fiŝoj el fiŝlagoj apud la vilaĝo, ni preparas por vi nombron da amuzaĵoj, tiel vi ne enuos. Ĉiuj necesaj informoj kaj elektronika aliĝilo, informoj pri trafiko troveblas en tiu ĉi paĝo:

<http://pably0.wix.com/lernejocz>

Via aliĝo estos valida nur post kiam ni ricevus vian partoprenkotizon en la kvanto de:

Ĝis la 1-a de aŭgusto 2012 la kotizo estas 250, - Kč (ĉeĥaj kronoj)

Post la 1-a de aŭgusto 2012 la kotizo estas350, - Kč

MUZEA NOKTO

La 2-an de junio jam la kvaran fojon nia Esperanto-Muzeo en Svitavy partoprenis aktive en programo de la Muzea nokto, okazanta ankaŭ en aliaj partoj de la urbo. La temo de la jaro estis „La muzeo vojaĝanta“, do la unuopaj programeroj invitis al vojaĝado tra la spaco kaj tra la tempo.

Ĉi-foje la aranĝo komenciĝis jam tagmeze kaj allogis preskaŭ kvardek partoprenantojn, inter ili ankaŭ kvin gastojn el Slovakio.

Ĉar la nova ĉi-jara ekspozicio rilatas al „125 jaroj de Esperanto“, ankaŭ la preparita programo plejparte rilatis al ĝi. Jarmila Rýznarová el Pardubice komence rakontis pri nestoro de la Esperantomovado en Ĉeĥio – František Vladimír Lorenc, kiu jam kiel 17-jarulo gvidis en nia lando la unuan Esperanto-kurson en la praga gastejo „U Pštrosů“ (Ĉe strutoj) kaj unu jaron pli poste (1890) eldonis en Pardubice proprakoste la unuan Esperanto-lernolibron por ĉeĥoj. Interesis aŭdi pri lia bunta kaj nefacila vivo en Brazilo kaj pri lia nekredbla lingva talento.



Al la programo kontribuis ankaŭ slovakaj gastoj. Ján Vajs gvidis nin laŭ spuroj de la fama vojaĝisto Tibor Sekelj (1912-1996) en Slovakio kaj Peter Baláž rakontis

pri la aktualaj aktivecoj de la organizo E@I (<http://www.ikso.net>), sukcese realiganta diversajn interretajn projektojn. Krome li malavare alportis valorajn librodonacojn por la muzea biblioteko, por kio apartenas al li nia danko!



Ĉar unu el la novaj muzeaj paneloj rakontas pri „Elstaruloj kaj Esperanto“, Petro Chrdle rakontis pri la kortuŝa vivhistorio de la plej konata denaska esperantisto Petr Ginz (1928-1944), mortinta en Aŭŝvico, kaj pri la libro „Taglibro de mia frato“, verkita surbaze de liaj notoj. Intereson vekis ankaŭ redaktoro Paŭlo Kaščák el Ostrava, kiu konatigis kun programo de la nova retradio Verda Stacio (<http://www.verdastacio.eu/>).

La prezentoj estis kompletigitaj per filmoprojekciado (specimeno el la filmo „Mefisto“, la muzikgrupo Kajto, traflugo tra pli ol cent jaroj da Universalaj Kongresoj k.a.). Ne mankis ankaŭ viva muzika programero, kiun povis partopreni ĉiuj ĉeestantoj, nome kantado de la muzikigita satira poemo „Estas mi esperantisto“ de Julio Baghy, sub gvido de Pavla Dvořáková, kiu ĉi-jare ĉef-aŭtoris la ekspozicion kaj gvidis tra la tuta muzea programo.

La ĉi-jara ekspozicio koncentriĝis pri ne nur ĉefaj tendencoj en evoluo de la Esperanto-movado, sed ankaŭ pri kelkaj interesaj elstaruloj aŭ forgesitoj, pri viktimoj de totalismo kaj pri kelkaj historiaj kuriozaĵoj kaj premieroj. Vi povas ekz. ekscii, kiel aspektis Insulo de la rozoj, kie en 1968/69 Esperanto estis oficiala lingvo, kaj kio kaj kial okazis pri ĝi. Vi povas vidi geaktojn de la fama kabaredo „Verda kato“ el Montmartro kaj scenon el filmado de la unua plene Esperanta filmo „Angoroj“. Vi povas ĝui unikan liliputan Esperanto-vortareton, enigeblan en alumetujon, kaj aliajn interesaĵojn.



La ampleksa libroekspozicio (kies pretigon grave helpis Miroslav Malovec) dokumentas historian evoluon de Esperanto-literaturo kaj lige al OSIEK-konferenco, okazonta en julio en Svita-

vy, ĝi prezentas ankaŭ librojn premiitajn de OSIEK kaj elekton de (scienc)fantaziaj libroj en Esperanto.

Ĉar la parta temo de tiu ĉi jaro estis ankaŭ Zamenhof/Esperanto-Objektoj, krom jam instalitaj du paneloj estis nove pretigita dosierujo kun pliaj fotoĵoj (grandparte realigitaj de Jiří Tomeček). Ankaŭ la muzea komputilo riĉiĝis kaj nun jam disponas pri kelkmil multkomunikilaj dokumentoj, kiujn dezirantoj povas ne nur trarigardi, sed ankaŭ elŝuti kaj forporti sur sia poŝmemorilo.

Novaĵo estis alirebligado de kuriozaĵoj kaj historiaj valorajoj el la muzeaj biblioteko kaj arkivo. La partoprenantoj povis enmanigi kaj trarigardi la historie unuajn Esperanto-periodaĵojn, la unuajn adresarojn kaj kongreslibrojn el la periodo antaŭ 1914, aŭ ekz. fotolibron pri germanaj militkaptitejoj el la unua mondmilito.



La vespero estis riĉigita per vizito de ekspozicio pri Namibia safario en la Urba muzeo (kaj gustumado de veraj afrikaj bifstekoj), per projekciado de vojaĝfilmoj (i.a. pri Mongolio, aŭstraliaj indiĝenoj, budhisma ŝtato Butano kaj amazonia praarbaro) kaj antaŭdorma kantado kun gitaro.

Kelkajn programerojn povas ĝui ankaŭ tiuj, kiuj persone ne ĉeestis la programon!

Sekvante aktualaĵon pri la Muzea nokto en <http://www.esperanto.cz> vi povas legi kelkajn prezentitajn tekstojn, aŭdi muzikon kaj vidi filmetojn. Sed tamen la etoson, „vivajn“ ekspoziciaĵojn kaj la bongustaĵojn pretigitajn de la lokaj klubaninoj bedaŭrinde por vi peri ne eblas.

Esperanto-Muzeon, situantan en la Domo de Ottendorfer apud la ĉefplaco, vi povas viziti dum la tuta jaro (krom lundoj). La enirbileton kontraŭ simbolaj 10 kronoj vi povas aĉeti en la vid-al-vida konstruaĵo de la Urba muzeo.



Laŭ interkonsento kun lokaj esperantistoj eblas mendi ĉiĉeronadon en Esperanto. Ĝia estonteco dependas de ĉiuj el ni – i.a. de ofteco de ĝia vizitado kaj de reeĥoj el eksterlando. Sendube helpas, se vi informos kaj invitos letere viajn geamikojn – krom via persona rekomendo sufiĉas referenci al la retejo <http://www.muzeum.esperanto.cz>, kie eblas trovi bezonatajn informojn, sed

ankaŭ artikolojn kaj fotogaleriojn.

Oni povas ankaŭ mendi romantikan tranoktadon rekte en la muzea turo (1 unulita, 1 dulita kaj 1 apartamento kun du- kaj trilita ĉambroj kun komunaj duŝejo kaj necesejo). La prezo estas 10 eŭroj popersone kaj ponokte – membroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Ĉeĥa Esperanto-Junularo ĝuas 2 eŭrojn da rabato (do la sumo egalas al 200 kronoj).

Kontaktadreso estas:

muzeagrupu@esperanto.cz, poŝta adreso Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, CZ-568 02 Svitavy, kontakto al gvidantino de la Muzea grupo Libuše Dvořáková: dvor.libuse@seznam.cz

Dimanĉe la 16-an de septembro dum la tuta tago okazos kaj en nia muzeo, kaj en la apuda Urba muzeo „Tago de malfermitaj pordoj“, dum kiu eblos ne nur senpage viziti la ekspoziciojn, sed ankaŭ sekvi ĉeĥlingvajn kaj aliajn filmetojn pri Esperanto kaj laŭpete surloke trarigardi kaj studi librojn kaj gazetojn el la muzea biblioteko. Fine ni ne forgesu sincere danki la Klubon de Esperanto-geamikoj en Svitavy por la oferema tutjara zorgo pri la muzeo. Ni antaŭĝojas pri via vizito kaj helpo dum informado pri nia muzeo eksterlande! Espereble ĝis la revido eĉ pli frue ol dum la sekvajara Muzea nokto!

*Pavla Dvořáková
teksto kaj fotoj*

Bahaismo en la muzeo

Ni povas aldoni, ke unu semajnon antaŭ la muzea nokto (26.5.2012) okazis en nia muzeo ĉeĥlingva prelego pri bahaismo, kiun prezentis s-ro Radek Holík el Baháí-societo en Ĉeĥio.

Plua ZEO en Svitavy

Sabate la 14-an de aprilo 2012 okazis renkontiĝo de esperantistoj en Svitavy. Alveturis 33 partoprenantoj el 21 lokoj de la respubliko (ekz. el Prago, Dobřichovice, Písek, České Budějovice, Ratiškovice apud Hodonín, Žamberk, Brno, Přerov, Prostějov, Chropyně, Moravské Budějovice kaj aliaj lokoj).



Rilate al la fakto, ke ĉi tie inter la tagoj 14-a kaj 20-a de julio 2012 okazos Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK, membroj de la loka klubo decidiĝis planti arbon kaj kadre de la konferenco senvaligi memortabulon. Ili elektis tilion, ĉar ĝi estas nia nacia arbo, kaj plantis ĝin sur la plej antikva loko de Svitavy.

La posttagmeza programo komenciĝis per vizito de renovigita urba stadiono, kiu ĉiujn ravis same per internaj ekipaĵoj kiel per eksteraj sportejoj. En muskolfortigejo ili ĝoje elprovis siajn fortojn. Ekstere kaptis ilian atenton ekzercejo por maljunuloj (por ekzerci brakojn kaj gambojn), ludejo por infanoj, bela futbalejo kun ĉirkaŭaj sprintvegoj, lumanta informtabulo (sur ĝi ankaŭ informo pri nia muzeo) kaj statuoj ĉizitaj el trunkoj de iam kreskintaj tie arboj.

En Esperanto-Muzeo la programo estis dediĉita al la 95-a datreveno de morto de la iniciatinto de Esperanto, d-ro Ludvík Lazar Zamenhof (14.4.1917). Enkonduke eksonis eseo pri liaj personeco kaj misio el la libro „Homo, kiu defiis Babelon“ voĉlegita de Miroslav Malovec el Brno. Pavla Dvořáková el Písek prezentis muzikigitan poemon de d-ro Zamenhof „Ho mia kor“ kaj Zamenhofecan baladon de la hungara poeto Kálmán Kalocsay. La ĉeestantoj povis vidi parton de dokumenta filmo de Djalma Pessaty el Brazilo "Zamenhof-mondcivitano".



Post alparoloj de klubaj reprezentantoj el ĉirkaŭaj urboj eldonisto d-ro Petr Chrdle prezentis sian freŝe novan eldonon de dramo R.U.R., verkita de Karel Čapek, esperantigita de Moraviaj Esperanto-Pioniroj (fakte Josef Řebíček) kaj ilustrita de Mirka Tomečková, okaze de la jam menciita konferenco OSIEK kun ĉeftemo „Sciencfikcio kaj robotoj“.

Antaŭ fermo de la programo estis inaŭgurita la unua parto de nove preparata tutjara ekspozicio laŭ temo „125 jaroj de Esperanto“. Gastoj povis partopreni en preparita kvizo kaj en lotumado pri valoraj premioj.

Libuše Dvořáková

Postřelmov nin surprizis agrable

Sabate la 12-an de majo 2012 kvin membroj de Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy partoprenis en renkontiĝo de esperantistoj en Postřelmov, kiun organizis la klubo de Šumperk. Tra Postřelmov ĉiĉeronis por ni nova membrino de la ŝumperka klubo Blanka Mohelová, kiu laboras en la uzino MEP Postřelmov - Carsin.



Tie nia antaŭtagmeza programo komenciĝis. Ni rigardis produktojn de formuoj por aŭtomobilaj vicpartoj, akriĝoj, kontrolan mezurejon. La estro de produktado prezentis al ni malnovajn maŝinojn kaj ankaŭ novajn, regatajn de komputilo, ekz. drattranĉilon, kiu per elektra malŝargiĝo tranĉas el ŝtalpeco tre precizajn konturojn de instrumentoj.

Ni trairis la vilaĝegon, kiu surprizis nin per siaj novaj stratoj, aranĝitaj ĝardenoj kun florantaj arboj, riparita elementa lernejo, infanĝardeno, kulturdomo, bela eta parko. Multaj urboj povus envii! Nia promeno celis al renesanca kripto de nobela familo Bukůvka el Bukůvka konstruita en 1592. Bukůvka estis moravia kavalira familio, kleraj reprezentantoj de nobelaro antaŭ la fatala batalo apud Prago (1620), ankaŭ ili partoprenis en

rezistado kontraŭ Habsburgoj. La kripto enirejo kun forĝita rozo estas riĉe ornamita. La subterejo protektas mumiigitajn korpojn de kvar personoj: Zikmund (Sigismondo) Bukůvka, lia edzino Barbora, filo Bernard kaj juna knabino Eliška (Elizabeta). La korpoj troviĝas en trarvideblaj ĉerkoj. Laŭ speciala kontrakto el 1612 la civito Postřelmov zorgas pri la kripto, kiu estas protektata kultura memoraĵo.



La posttagmeza programo okazis en restoracio „U Kelvína“ (Ĉe Kelvino). Kunvenis 28 partoprenantoj el 13 lokoj de la respubliko. Venis ankaŭ denaska svedo, kies edzino estas filino de esperantisto el Šumperk. Danke tion li parolas ankaŭ ĉeĥe kaj aliajn lingvojn.

Kiel kutime la programo prezentis invitojn por aliaj renkontoj. Per plej multaj planataj aranĝoj povis fieri esperantistoj el Svitavy: sabate la 19-an de majo Infana Esperanto-Tago, la 26-an de majo en Esperanto-Muzeo prelego pri Bahaa kredo, la 2-an de junio Muzea Nokto kaj inter 14-a kaj 20-a de julio Internacia Konferenco de OSIEK.

Libuše Dvořáková

10 jaroj de Societo

La 18-an de aprilo 2012 pasis precize 10 jaroj ekde fondiĝo de *Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno*. La solenan kunvenon gvidis prezidantino Věra Podhradská, kiu rememoris fondiintojn (S. Barták, F. Frýbert, A. Veselý, J. Werner) kaj ilian celon direkti la informadon pri la internacia lingva problemo al ekstermovadaj gravuloj. Plejparto de membroj de la Klubo aliĝis ankaŭ al la Societo, tri kunvenojn monate okazigas la Klubo en la strato Starobrněnská, unu la Societo en la kvartalo Kohoutovice.



La 19-an de majo 2012 la societanoj faris komunan ekskurson al la akvobaraĝo de Brno por festi la datrevenon ekster la klubejo. Komunan tagmanĝon en gastejo apud la haveno de lagaj ŝipoj partoprenis dudeko da personoj, inter ili gastoj el Ústí n. Labem, Frýdek-Místek, Prago kaj eĉ Hindio. Post la tagmanĝo duono de la partoprenantoj entreprenis promenon laŭborde de la lago, la ceteraj forveturis, parte ŝipe, parte buse, al la kastelo Veveří, kie ĝuste tiutage okazis en la kortoj kulturaj programoj kun multaj standoj vendantaj memoraĵojn kaj manĝetojn.

-mm-

fotis O. A. Fischer

Loga programo en la franca Esperanto-kastelo Greziljono

Somera programo kun 4 laŭtemaj semajnoj:



julio-21/28: **Art-amatora semajno** kun teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj kaj intensaj kursoj.

julio-28/aŭgusto-04: **Alternativa semajno** kun verd-politika seminario kaj E-kursoj; por vegetaranoj, verduloj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, naturistoj kaj tendumantoj.

aŭgusto-04/11: **Turisma kultura semajno**, kursoj de franca lingvo kaj Esperanto antaŭtagmeze, ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro posttagmeze.

aŭgusto-11/20: **Pupteatra festivalo** por infanoj, junuloj, familioj. Farado de manpupoj kaj vesperaj spektakloj kun Christoph Frank. Muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj E-kursoj.

Kontakto: kastelo@gresillon.org, [+33-241 89 10 34](tel:+33241891034), www.gresillon.org

Adreso: Gresillon, 49150 SAINT MARTIN D'ARCE, France

Infanaj esperantistoj ĝuis Esperanto-tagon en Svitavy

Post unujara paŭzo la esperantistoj en Svitavy decidis okazigi novan „Esperanto-tagon“. La aranĝon ili organizas jam plurajn jarojn por infanoj, kiuj lernas Esperanton. La ĉi-jara infana tago okazis sabate la 19-an de majo 2012 en belega vetero kaj etoso. Alveturis 24 partoprenantoj el 6 lokoj de la respubliko. La plej longan vojon faris infanoj el Ratíškovice apud Hodonín.



Verŝajne la plej granda travivaĵo por la infanoj estis vizito de la stadiono de Svitavy. Ili enrigardis en la rilaksan centron kun kirlokuvoĵoj kaj ŝvit-ĉambro, en la vestejojn de sportistoj kaj en muskolfortigejon, kie ili elprovis kelkajn ekipaĵojn. Tamen la plej belan panoramon donis la tribuno, kien ili ascendis fine de la vizito. En la areo de la stadiono estis ankaŭ preparita konkurso: la infanoj serĉis literojn, el kiuj ili povis kunmeti vortojn en Esperanto. Poste ili povis ĝissate petoli sur diversaj ludo-ekipaĵoj. Sekva programo kun

manĝeto estis preparita en la Esperanto-muzeo. Ĉi tie ili konkursis ne nur en scioj de Esperanto, sed ankaŭ en lerteco kaj simplaj sport-disciplinoj. Ĉiu venkinto ricevis diplomon, kiu memorigos lin pri liaj komencoj en Esperanto.



Plenaj de novaj travivaĵoj la infanoj forveturis hejmen kaj jam nun ili ĝojas atendente la infanan tagon en la venonta jaro. Por la organizantoj la radiantaj kaj kontentaj vizaĝoj de etaj esperantistoj estis la plej granda rekompenco.

Matěj Nárožný, Libuše Dvořáková



Ovofritaĵo

La 23-an de majo 2012 partoprenis 12 membroj de EK Ostrava Vítkovice renkontiĝon okaze de ĉiujara jam tradicia ovofritaĵo. Nunjare ĝi okazis en pitoreska regiono de Beskydy en Frýdlant nad Ostravicí en privata domo de familio de Jarda Suchánek.



Ankaŭ mi havis feliĉon ricevi inviton por partopreni tiun aranĝon. Sub belega suna ĉielo ni ĉirkaŭsidis ĉe preparita fajreto kaj ĝuis belecon de proksimaj montoj, kiujn dominas Lysá Hora. Unue ni sendis imagajn salutojn ĉielen al forpasintaj membroj Drahomír Kočvara, Oskar Senft kaj Milan Neuvirth, kaj poste babilis, dum intertempe la oferema edzino de Jarda preparis ovofritaĵon en malgranda kaldrono super fajreto. Por tio ŝi uzis 37 ovojn, kiujn alportis kune kun diversaj aliaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj la alvenintoj. La regalo estis vere riĉa.

Sed ni ne nur manĝis kaj trinkis, sed



ankaŭ babilis, kantis akompane de gitaro de Jarda Suchánek, vizitis ankaŭ lian patriron, kiu ĵus festis sian 91-jariĝon. Ŝi ja estas multjara esperantistino, kelkfoje ŝi vizitis ankaŭ la tendaron en Lančov kun sia tiam ankoraŭ tre juna filo. Al ŝi oni povas danki, ke el Jarda fariĝis esperantisto. Nome ŝi proponis al sia filo: vi jam ludas violonon, nun vi ludos ankaŭ pianon, aŭ lernos Esperanton, kaj feliĉe, li elektis la duan eblon. La amuzado daŭris preskaŭ ĝis vespero kaj ni bedaŭrinde devis adiaŭi. Ni dankas al geedzoj Suchánek pro gastigado kaj atendas venontan renkontiĝon aŭ kunvenon aranĝitan de EK Ostrava Vítkovice.



*Věra Podhradská
foto Jarka Čejková*

Pri Esperanto-monumento en ĉeĥa ĵurnalo

La 25-an de majo 2012 la ĵurnalo de Frýdek-Místek (www.frydeckomistec-kydenik.cz) publikigis artikolon de Boleslav Navrátil *Pomník doktora Esperanta byl nalezen v Bohumíně* (Monumento de d-ro Esperanto estis trovita en Bohumín).



Ne forgesu sekvi AKTUALAĴOJN en la retejo www.esperanto.cz (kaj ĉeĥlingve kaj esperantlingve)! Kontribuaĵoj de la membroj estas bonvenaj! Skribu al retejo@esperanto.cz. Se vi deziras ricevadi kelkfoje jare ĈEA-Retkomunikojn kun interesaj koncizaj novaĵoj el Esperantujo, bv. sendi vian retadreson al retkomunikoj@esperanto.cz.

Korespondu kun japanoj

Se vi deziras korespondi kun japanoj, bonvolu turni vin al Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, Japanio. Bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nian laboron.

<http://www.esperantofre.com/eks/>
N. Sakurai

Fajro ĉe Vinilkosmo

Estimataj muzikŝatantoj, la fajro en kelkaj ejoj ĉe Vinilkosmo kaŭzis grandajn zorgojn kaj eluzon de multa energio en la fino de la pasinta jaro. Sed la unua trimonato de 2012 estas tre riĉa je projektoj kaj novaĵoj. Kaj do ni havas la jenan okazon paroli al vi pri pli ĝojaj perspektivoj.

La ĉefa evento estas sendube la publikiĝo de la unua tutesperanta albumo de Zhou-Mack Mafuila. Li estas delonga muzikisto kun muzikaj kaj kulturaj radikoj tro diversaj por prirakonti alie ol en la lingvo por ĉiuj. Li estas absolute malkovrenda!

Ankaŭ Eterne Rima preparas surprizon por la venonta monato, kaj konfirmas la ĉeeston de hiphopo en la vasta kantmuzika horizonto en Esperanto. Li ofertas kaptindan ekskluzivaĵon dum la tuta monato majo.

Malsupre ni prezentas kelkajn videofilmojn kaj muzikeltiraĵojn, kaj ankaŭ novan aŭskultindan retradion.

Ni esperas ke vi pasigos agrablan momenton de senstreĉiĝo!

Nia kompleta katalogo ĉe :
<http://www.vinilkosmo.com>

380 esperantistoj ekzameniĝis en 17 landoj samtempe

